

Rimarkoj pri multlingvismo trans la sistemon de Unuiĝintaj Nacioj

Csaba Kőrösi, Prezidanto de la 77-a sesio de la Ĝenerala Asembleo

Tema Kunsido pri Multlingvismo trans la Sistemon de UN 12 junio 2023

[anglalingve:]

Ekscelencoj, Gesinjoroj, Kolegoj, Sobh Bekheir al vi ĉiuj.

Tio signifas "bonan matenon" en la farsia – la lingvo de Rumi, la poeto de la 13-a jarcento, kiu iam skribis: "Parolu novan lingvon, tiel ke la mondo estu nova mondo." La influo de Rumi transsaltas landlimojn kaj barilojn jam sep jarcentojn. Havante tian daŭripovon, li ja miaopinie ion sciis pri multlingvismo.

Uzi alies lingvon estas ofte ŝlosilo por malfermi novajn eltrovojn. Ĝi povas indiki geston, amikan intencon. Ĝi helpas nin renkontiĝi mezvoje. Ĝi povas lumigi niajn ideojn – kaj doni sparkon al persona rilato.

Ne ĉiuj lingvoj estas parolaj. Iuj lingvoj estas gestaj. Aliaj estas tuŝaj. Sed, alte taksante ĉiun lingvon ni pligrandigas la eblecon superi dubojn – porkonstrui, aŭ, niaepoke, rekonstrui konfidon.

—Por fari decidojn kiuj estas signifoplenaj al ĉiuj.

[franclingve:]

Multlingvismo estas unu el la fondaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj. Krome, ĝi estas unu el la antaŭkondiĉoj de nia sukceso dum ni frontas inundon da mondaj defioj.

Pasintan jaron, la Ĝenerala Asembleo akceptis rezolucion pri multlingvismo. Ĝi bonvenigas la uzadon de lingvoj oficialaj kaj neoficialaj de la Departamento de Tutmonda Komunikado, en ties sinetendo al specifaj lokaj publikoj.

Ĝi ankaŭ rekonas la klopodojn de la Sekretariato por uzi neoficialajn lingvojn – kiel ekzemple la portugala, la hindia, la svahila, kaj la persa – en la kadro de niaj penadoj por postlasi neniujn personojn.

[anglalingve:]

Kiel mem multlingvulo, mi aplaŭdas tiujn decidojn.

En la Ĝenerala Asembleo, mi klopodas faciligi kunlaboron inter diversaj grupoj de ŝtatoj kaj koncernatoj.

[ruslingve:]

Mia misio estas antaŭenigi toleremon, akceptiĝon, reciprokan respekton kaj sinceran agnoskon de diverseco de vidpunktoj. Kaj ĉiutage mi rimarkas ke la kapablo paroli alian lingvon povas semi kompreniĝon inter diversaj partioj.

Ofte, unu vorto en la lingvo de alia persono sufiĉas por rompi la glacieron.

[anglalingve:]

La sesmil lingvoj parolataj en la mondo elmontras la forton kaj riĉon de niaj socioj.

Ili ĉiuj subtenas kaj riĉigas nian signifoplenan ekziston. Ni devas konservi tiun antikvan tapiŝon de sinesprimado.

Tio speciale veras se temas pri lingvoj borde de estingiĝo, el kiuj multaj estas uzataj de Indiĝenaj Popoloj. Kiel la Nobelpremiito Octavio Paz tiel elokvente memorigas: "Kiam unu lingvo estingiĝas, malaperas unu homa imago."

Al tio mi aldonus: malaperas ankaŭ peco de nia homeco.

Ni faru ĉion eblan por malhelpi, ke tio okazu.

[arablingve:]

Kiel ni subtenu la aferon de multlingvismo?

Unue, disvastigante la ideon de lingva diverseco.

Due, certigante, ke gejunuloj havu aliron al edukado en sia gepatra lingvo.

Kaj **trie**, elmontrante al junaj lernantoj lingvojn malsimilajn al la propraj, tiel ke ili vere valorigu la ĉirkaŭan mondon.

[anglalingve:]

En Unuiĝintaj Nacioj, ni devas trovi vojojn por prioritatigi rimedojn por multlingvaj praktikoj: por uzi kiel eble plej multajn lingvojn ĉi tie en nia organizo – kaj respekti tiun uzadon. Kaj ĉiam demandi: kion plian ni povas fari por etendi nian mesaĝon preter la propraj muroj? Temas pri muroj de kutimo, ĉiutageco, rezignacio, kaj – ni honestu – pigreco.

Tiel pensante, mi estas dankema al la organizantoj, ke ili iniciatis tiun ĉi gravan diskuton hodiaŭ.

Mi avide aŭskultos viajn ideojn, viajn sugestojn.

Kaj mi esperas, ke ni ĉiam memoros la saĝan eldiron de Amy Chua: “Ĉu vi scias kio estas fremda akĉento? Indiko de kuraĝo.”

Dankon.